

Intervjuo kun Claude Piron (7), pri la arto traduki kantojn en esperanton;
pri traduk-malfacilaĵoj.

Radioprelego de Claude GACOND, SRI, 733/112, 1977 oktobro 26, 28 kaj 29.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1977-15/SRI-1977-15-A-2-112-Claude-Gacond-Intervjuo-kun-la-verkisto-kaj-poeto-Claude-Piron-7-pri-traduko-de-kantoj-en-Esperanton.mp3>

Cl.- Parolas Claude Gacond. Ni aŭdigas al vi hodiaŭ la lastan parton de intervjuo, kiun ni realigis kun la verkisto kaj poeto, Claude Piron, pri la temo: tradukado de kantoj en esperanton. Ni memorigas al vi ke Claude Piron tradukas kanzonojn el multaj lingvoj.

Hodiaŭ li parolos al vi pri traduk-malfacilaĵoj.

En la antaŭa intervjuo vi parolis nur pri la kvalitoj de esperanto. Sed, ĉu kelkfoje vi ne frontas al nesolveblaj problemoj, kiuj montras la limon de la tradukarto eĉ por esperantisto ?

CP.- Kompreneble. Kelkfoje oni stumblas kaj trovas neniun rimedon solvi la problemon. Kaj tio ĉefe okazas, kiam temas pri koncepto kun tiel fortaj, nur naciaj ide-asociacioj, ke oni ne povas redoni ĝin en iu ajn lingvo. Ekzemple, en franca kanto, kiun mi tre ŝatas, troviĝas jena komenco :

(CP kantas en la franca)

Esperante ĝi fariĝas jena :

(CP kantas en esperanto)

Nu, la traduko estas laŭvorta, sed tamen io gravega mankas. Kiam franclingve oni diras ‘la butte’, tio almenaŭ por francoj kaj ĉefe por parizanoj, tuj elvokas la kvartalon Montmartre en Parizo. Kaj tio tuj elvokas tutan serion da ideoj, bildoj, sentoj, kiujn la vorto uzata en esperanto ĉi tie : ‘altejo’, absolute ne esprimas. La esperanto-traduko de tiu kanto multe pli fidele similas la originalon ol tiu en iu ajn alia nacia lingvo. Kaj mi pensas, ke tion oni devas konsideri, kiam oni parolas pri la nesolveblaj problemoj, pri la begativa flanko de tiu kanto-tradukado, estas, ke oni devas kompari tradukon ne nur kun la originalo, sed ankaŭ kun la tradukoj en aliaj lingvoj. Kaj mi dubas, ke tiun kanton oni povus traduki same bone en alian lingvon. Mi ne scias, ĉu sufiĉe multe da vi konas la francan kaj kapablas kompreni ĝin. Se jes eble ili rimarkos, kiel facile la esperanto-traduko adaptiĝas al la originalo. Jen aliaj strofoj el la sama :

(CP kantas en la franca)

Esperante :

(CP kantas en esperanto)

Cl.- Ĉu vi povus doni alian ekzemplon de nesolvita tradukproblemo ?

CP.- Jes, kompreneble. Mi pensas pri tiu usona kanto de ministoj. La refreno en la angla estas :

(CP kantas en la angla)

Kaj tiel plu. Nu, tio signifas, ‘vi ŝarĝas 16 tunojn, kion vi ricevas ? Vi estas pli aĝa unu tagon kaj pli profunde en la ŝuldoj.’ Nu, esprimi tiom da konceptoj en tiel malmulta spaco eblas nur en malmultaj lingvoj, inter kiuj la angla. Mi ne kapablis redoni la tuton en unu sola frazo en esperanto. Sed tamen estis solvo. La solvo konsistis el tio, ke oni ŝanĝu la refrenon. Dum la angla havas post ĉiu strofo similan, eĉ saman, tute saman refrenon, en unu el la esperantaj refrenoj mi metis la punkton pri la aĝo kaj en alia la punkton pri la ŝuldoj. Tiel fariĝas jene :

(CP kantas en esperanto)

Tio estas la unua refreno, kiu respondas al la angla ‘deeper in debt’, pli profunde en la ŝuldo, kaj jen la alia, kiun oni kantas post la dua strofo :

(CP kantas en esperanto)

kaj tiel la du sencoj, la du konceptoj de la angla refreno estas fidele konservataj en la esperanto-traduko. Kaj estas interese vidi, ke en la franca versio de tiu kanto, kiu estis publikigita, la koncepto pri ŝuldoj simple forestas.

Cl.- Per tiu ĉi elsendo ni konkludas serion de sep intervjuoj, kiujn ni realigis kun la poeto kaj tradukisto Claude Piron pri la temo traduko de kantoj en esperanton. Vi aŭdis el Svislando Claude Gacond kaj Claude Piron. Ĝis reaŭdo!